

Esperanto Societo Frankfurto

# Esperanto-Informilo

## Junio 2026




Foto: G. Hennemann, la 26-an de majo en Vieno: “La ĝardenoj de Belvedere en Vieno estas juvelo de baroka pejzaĝarkitekturo kaj, kune kun la du palacoj, formas harmonian unuecon, kiu estis nomumita Monda Heredaĵo de Unesko.”

Mesaĝo de la prezidanto:

La ĉeĥa-germana kongreso dum pentekosto en urbo Olomouc, elparolata kiel Olomoŭc (germane: Olmütz,) estis benata kun belega kaj ne tro varma vetero. La renkontiĝejo en urba parko “Flora” estis barokstila konstruaĵo, antaŭe oranĝejo, kun restaŭracio por sidi enen kaj eksteren. Estiĝis vigla interŝanĝo de spertoj kaj opinioj inter la ĉeestantaj ĉeĥoj kaj germanoj, ĝuste tiel kiel devus esti tute normala afero en kunkreskanta Eŭropo. Nur bedaŭrindas, ke pro la malfrua anonco ĉeestis nur malmulte da partoprenantoj ambaŭflanke. Resume mi konstatas ke Olomouc estas vere vizitinda moderna urbo kiu tre profitas de sia bela ĉirkaŭajo apud rivero Moravo, sed pro multe da sakralaj konstruaĵoj konservis sian specialan historian ĉarmon.

G. Hennemann, la 30-an de majo 2026



Rubrikoj ĉi-numere:


- Programo
- El la klubo
- Eseo
- Diversaĵoj
- Esperantaĵo
- Lasta paĝo


Kolofono:
Redaktoro teamo:
Georg Hennemann
Ulrich Fellmann
Korektanto: F.U.

c/o Georg Hennemann
Rehgartenstrasse 16
35683 Dillenburg
Tel.: 02771 8196614

**Bankverbindung / bankkonto:**
Esperanto-Gesellschaft F.a.M
IBAN: BE92 9051 1007 7223
BIC: TRWIBEB1XXX
bei: Wise, Belgien

**Jahresbeitrag / jarkotizo:**
ESF+DEB-Beitrag: 96 €
Familienmitglied: 48 €
Nur ESF: 24 €
Familienmitglied: 12 €

# Programo

**Unua mardo**
La 2-an de junio 2026

“Elsendo de E-Informilo“

———

**Dua mardo**
La 9-an de junio 2026
ekde la 19-a horo:  Interna babilado per Jitsi

Ligilo: https://meet.jit.si/EsperantoFrankfurtamMain

———

**Tria mardo**
Surloke: Saalbau MÜZ Schönhof, Rödelheimer Str. 38, 60487 Frankfurt am Main

Dienstag, den 16. Juni, 2026 --- Mardo, la 16-an de junio, 2026

18:30 h
Lingva rondo
“Wortpaare” “Vortparoj”
R. Pflüger

19:30 h
Vortrag Prelego
“Die Sprache Tokipona” “La lingvo Tokipona”
U. Fellmann kaj R. Pflüger

———

**Kvara Mardo**
la 23-an de junio
ekde la 19-a horo: „Senprograma samideana babila renkontiĝo“
Stattcafé, Grempstraße 21, 60487 Frankfurt am Mai

---

Bildfonto kappaĝo: Panorama vido el la 2021 rekonstruita Goetheturm en Frankfurto je Majno

By Tobias.Nicol – Own work, CC BY-SA 4.0, https://commons.wikimedia.org/w/index.php?curid=103455745,

https://commons.wikimedia.org/wiki/Henninger-Turm#/media/File:Cityscape_Frankfurt_2021_Panorama.jpg

# El la klubo

**Anoncoj:**

- 18.07.2026 14:00 Uhr Somerfesto en frankfurta Palma Ĝardeno (Palmengarten),
  Ni renkontiĝos en Kafejo Siesmayer apude.
  https://www.cafe-siesmayer.de/
- 11.08.2026 18:00 Uhr Ni renkontiĝas sur Rossmarkt kaj ĝuas la etoson de la „Pomvinfesto“.




**elstara foto:** instigita de U. Fellmann, 28-a de aprilo. Mia foto de la tago: „Ni parolis pri personaj propraj nomoj, la reformita Eo de Zamĉjo, Tokipono, Solresol, koloroj, sinestetikistoj, matematiko, infanoj, kma.“

# La okazaĵo en ICE trajno de Vieno al Frankfurto

Eseo de Georg Hennemann

Mi volas rakonti al vi ion embarasan aferon kiu okazis lastan merkredon dum mi reveturis de Vieno al Frankfurto en ICE trajno. Post kiam ni atingis Lincon (Linz apud Danuvo) kontrolisto venis por kontroli la biletojn. La voĉo de la dejoranta kontrolisto estis jam dekomence aroganta kaj eĉ sonis malĝentile. Kiam unu malhelhaŭta virino ne tuj povis montri la ĝustan bileton, sed anstataŭe nur la bileton por rezervado de sia sidloko, li tute perdis sian memregadon. Unue li laŭtege grumblis aŭdebla por la tuta cirkaŭaĵo ke tiu virino verŝajne estis unufoje en Eŭropo kaj videble ĉagrenita demandis ŝin denove kaj denove montri la ĝustan bileton. Kiam la virino fine montris al li bileton kiu validis nur por alia pli frua aŭ eble pli malfrua trajno li reagis tute ne profesie, do ne demandante, pro kiaj kialoj ŝi ne estis en la ĝusta trajno … male li daŭrigis argumenti kaj plendi kontraŭ ŝi, kial ŝi ne tuj montris al li ŝian bileton. Kontraŭe al ŝia sidloko sidis juna homo el barato, kiu kiel ŝi ne bone majstris la germanan lingvon, kaj kiu pro tio ne bone povis subteni la virinon. Sed nun la aliaj pasaĝeroj intervenis kaj provis subteni la virinon, inter ili du junulinoj kiuj ĵus faris ilian altlernejan diplomon (germane; Abitur). Kaj la prompta reago de la kontrolisto estis ke oni ne intermiksiĝu en la afero, ke ili nenion komprenas kaj ke ili devus unue iri mem labori por taksi la situacion. Alia virino jam komenciĝis registri la konfrontiĝon per sia saĝtelefono. Kaj ankaŭ ŝi nun rimarkis kontraŭ la kontrolisto, ke li tute ne reagis profesie kaj sennecese senpacienca. Ŝi admonis ke ŝi volis plendi je firmao „Deutsche Bahn“ pro lia konduto. Tre kolerigita li nun interrompis sian kontroladon kaj foriris. Mi mem ne tuj reagis, ĉar mi sidis iom for, sed ankoraŭ sufiĉe proksime por aŭskulti ĉion. Mi ankaŭ konstatis al la ĉeestantoj ke lia konduko postlasis malkonvenan, ne profesian impreson, kaj ke eble li suferis malbonan tagon – sed mi konsentis ke oni ne permesu tiun kondukon kontraŭ pasaĝeroj. Post kiam la kontrolisto forestis daŭrigis la diskuto inter la ĉeestantoj ankoraŭ kvin ĝis dek minutoj en la angla lingvo, ĉar la nigrulino ja estis el usona ŝtato. Mi konstatis ke nun la baratano, kiu ĝis nun tute ne partoprenis en la diskuto, pli kaj pli partoprenis en la babilado kaj baldaŭ la aliaj retiriĝis, ĉar ambaŭ nun parolis pli rapide ilian anglan idiomon. Mi mem denove lernis de tiu okazaĵo kiom grava kaj dezirinda estas vivante en regiono, kie oni rajtas plendi kaj ne estas tuj suspektata de la propra ŝtato aŭ registaro, kiel nun en rusio aŭ aliaj malliberalaj landoj, kiel la homaj rajtoj ne estas tiel estimata kiel ĉi tie. Pro tio estas tute nekomprenebla, ke partioj kiel AFD, BSW kaj aliaj partoj de la dekstrema aŭ maldekstrema rando tiel malzorgema kaj senprudenta povas argumenti por cedi Ukrainion al Rusio, kie nun regas Putin kun potenco kiel ruĝa reĝo. Espereble ni ja reflektas kaj sufiĉe estimas tion nian unikan atentigitan staton ankaŭ dum la venontaj balotoj – alikaze Alice W. kaj Björn H. baldaŭ zorgas ke ni spertas nian bluan miradon (germane: blaues Wunder) kaj ni ĉiuj elvekiĝos en mirlando regata de la ruĝa reĝino kies fifama ekkrio estas: "Dekapigu lin!"



# La reveno de la Historio kiel krizo de Demokratio.

Eseo de Felmano Ulriko

Antaŭnelonge mi estis kunfamilie en la urbocentro de Frankfurto ĉe Majno. Post ioma promenado ni konstatis, kiom bela kaj interesa la urbo estas, kvankam ĝi bruas kaj plenas de homoj, ja, eble pli bone diri: ĉar ĝi bruas kaj plenas de homoj. Iam ni atingis la riverbordon. Kiom paca ĝi ŝajnis, tiom da homoj sidantaj, irantaj, biciklantaj sin sunantaj, trankvile, aŭ mallaŭte babilantaj. Pro la multaj malbonaj mondaj okazaĵoj, kaj precipe la Putina milito en Ukrainio, mi tiumomente pli spertis kiom idilia ĝi estas dum semajnfinoj (kaj fakte eĉ labortage, kompare al multaj lokoj de la mondo), kaj mi demandas min nun ofte, ĉu oni tion konservi sukcesos, aŭ ĉu tio baldaŭ finiĝos. Iuj de vi eble memoras la jarojn post 1987, kiam la „fera kurteno“, tiu preskaŭ nepenetrebla limo tra mezo de Eŭropo, falis, Germanujo reunuiĝis, Sovjetunio liberigis multajn naciojn kaj iĝis Rusujo. Oni pensis ke la libera demokratio laŭ la okcidenta stilo venkis. La usonano Fukujamo skribis vaste legatan libron titolanta „La Fino de Historio“, en kiu li priskribis, kiel nun la tuta mondo pli kaj pli transformiĝos al landaro funkcianta kiel Usono kaj Eŭropo, militoj baldaŭ tute finiĝos, internacia kunlaboro regos. Kritikistoj de tiu opinio, kiuj nomis tion naiva, estis priridataj, ili esis vidata kiel pasintece pensantaj personoj kiuj ne komprenis, kio okazis.



Intertempe, la afero denove ŝanĝiĝis. Dudek-tridek jarojn poste, la mondo estis jam tute alia, kaj la revoj pri eterna paco kaj tutmonda okcidenteca demokratio ne nur ne plietendiĝis, sed eĉ revenis despotioj al demokratioj, kiel en Turkujo, Hungarujo, Rusujo, tempe Brazilo kaj Polujo, kaj militoj al jam pacaj landoj kaj regionoj kiel Ĉeĉenujo, Sirio, Armenio, Ukrainio, Mjanmaro, Sudano, Kongolo, k.a.

Pinta bato al tiu imagita paca erao estis la elekto de Usona prezidento, kiu estas multfoje prijuĝita fraŭdisto, virinmolestanto, mensogisto, narcisto, ŝtelisto, kaj alvokisto al puĉo, t.e. perforta preno de la politika forto en Usono, kiel faris Hitlero dum la 1920aj jaroj, kun la diferenco, ke la usona puĉemulo ne mem iris al la strato, ĉar li ankaŭ estas timemulo. Post kiam li estis denove elektita prezidento, malgraŭ la nesukcesa puĉo (denove samkiel Hitler en Germanujo) li pardonis kaj liberigis multajn de la puĉistoj, kiujn la kortumoj estis senditaj al malliberejo. Tiu sama prezidento poste komencis instali specialan tutlandan batalantaron, nomita „ICE“, por persekuti kolorhaŭtajn kaj alie neŝatatajn personojn, kaj amase senkortume kaj kontraŭleĝe metis milojn da hazarde surstrate prenitaj homoj en grandajn „detencentrojn“, kiel la koncentrejoj de la nazioj, do, la ICE-trupoj estis la „SA“, la „Sturmabteilung“ de Trampo, laŭ la modelo de la Hitlera. Tiuj paraleloj ne estas hazardaj. Li mem konfesis ke li ne legas librojn, escepte de unu, kaj lia edzino iam diris, ke tiu libro, kuŝanta apud lia lito, estas la paroladoj de Hitler, kiujn li ofte legas.

Ankaŭ en ekstera politiko, Trampo enkondukis novan bizaran vojon: Li plurfoje postulis ricevi Nobelpremion pri Paco kaj asertis, ke li finis jam sep militojn, pri kiu neniu sciis, kaj kelkajn semajnojn poste li komencis enkonduki tre altajn doganimpostojn al ĉiuj landoj de la mondo, escepte al Rusujo kaj Norkoreio. Poste li anoncis, ke li volas aneksi Kanadon, semajnon poste li aldonis Grenlandon. Post tio li postulis petrolon de Venezuelo kaj bombis tiun landon kaj deduktis ties diktatoran prezidanton, poste li rakete atakis Iranon kaj deklaris, ke oni nun detruis ĉiujn de ties nukleaj raketoj, poste li minacis ataki Kubon. Kelkajn semajnojn poste li startis tutan militon kontraŭ Irano (kvankam li dirintis ke „li“ jam detruintis ties atomraketojn), murdis i.a. la ŝtatestron, kaj deklaris, ke nun usonamika registaro estos starigata.Tio tamen ne okazis, anstataŭe, Irano repafis, atakis la najbarajn arabajn ŝtatojn kiuj estas aliancitoj al Usono kaj de kie la usonaj aviadiloj atakis Iranon. La ŝiptransporto de patrolo en la Ormuza markolo haltis, kaj la petrolprezoj tutmonde altiĝis kaj kaŭzis mankojn en malriĉaj landoj, precipe en Afriko kaj Orientazio.

Dume, la jam kvarjara Rusuja milito kontraŭ Ukrainio, kiu devis daŭri laŭ Putino nur kvin tagojn ĝis konkero de Ukrainio, pludaŭris, la perdoj da vivoj atingis ĉirkaŭ miliono da homoj, certaj nombroj tamen ne ekzistas.

Kaj oni ne forgesu, ke jam sen tiuj tre damaĝaj kaj homojn buĉantaj militoj ekzistis kaj ekzistas sufiĉe da defioj kaj minacoj, el kiuj la klimatoŝanĝiĝo ne estas la plej malgranda.

Eĉ en riĉaj landoj oni tion sentas. Ankaŭ en la landoj de Eŭropo troviĝas grandaj politikaj krizoj, precipe en la plej grandaj landoj, en Britujo (pluraj regestroj dum kelkaj jaroj, ekonomia krizo sekve de la Briteliro), en Francujo (ĉiuj reformoj estas blokitaj per perfortaj manifestacioj), en Germanujo (neglekto de infrastrukturo dum la lastaj 30 jaroj gvidis al kreskanta nombro de necesaj fermoj de trajnlinioj, pontoj kaj stratoj). En Italujo dekstremula partio post elekto pace transprenis la registaron, kaj la lando estas tre multe enŝuldiĝinta. En Hispanujo, tera arideco senhalte plietendiĝas.

Ankaŭ en Germanujo, la dekstrema partio „AfD“ gajnas jam delonge kreskantan nombron da voĉoj. En la teritorio de iama GDR, la AfD jam estas la plej forta partio.

Pro tio mi antaŭnelonge skizis por mi mem, kiuj estas la ĉefaj politikaj sistemoj en la landoj de la nuntempa mondo, kaj kio ilin karakterizas. Jen mia subjektiva listo:

Sekve de ĉiuj tiuj minacoj, kiujn ni hodiaŭ havas, nun pli kaj pli ofte okazas diskutoj: ĉu la demokratio estas stabila? Ĉu demokratioj estas netaŭgaj por solvi tiajn krizojn? Ĉu demokratio estas devige malrapide reaganta, ĉar ĉiam iu blokas la solvojn pro egoismaj interesiĝoj?

La sep bazaj specoj de ŝtatoj:

1. Despotio: Se vi ne kredas kaj faras, kion la reganto ordonas aŭ postulas, vi estos punata, torturata, aŭ murdata. Same kiam vi publike kritikas la despoton.

2. Monarĥio: Se vi ne kredas kaj faras kion la reĝo ordonas aŭ postulas, vi estos punata, torturata, aŭ murdata. Same kiam vi publike kritikas la monarĥon.

3. Anarĥio: Kion ajn vi kredas aŭ faras, vi povas esti de iu ajn punata, torturata, aŭ murdata.

4. Religia despotio: Se vi ne kredas kaj faras kion la regantoj ordonas aŭ postulas, aŭ, se vi ne sekvas la religiajn regulojn kaj ritojn, vi estos punata, torturata, aŭ murdata. Same kiam vi publike kritikas la regantan religion aŭ la regantajn moŝtojn.

5. Komunismo: Se vi ne kredas kaj faras kion la reganta partio ordonas aŭ postulas, aŭ, se vi ne estas laboristo, farmisto, soldato aŭ partia funkciisto, vi estos punata, torturata, aŭ murdata. Same kiam vi publike kritikas la oficialan ideologion aŭ la regantajn moŝtojn.

6. Demokratio: Vi rajtas diri vian veran opinion. Vi povas voĉdone influeti, kiu regos. Konfliktoj estas traktataj de senpartiaj kortumoj. Via religio estas elektebla de vi mem. Vi rajtas publike kritiki la ŝtaton kaj la regantojn.

7. Ŝajna / fiaskinta demokratio: Vi rajtas diri vian veran opinion, sed prefere ĝi kongruu al tiu de la reganta partio. Vi povas voĉdoni, sed tio ne nepre influos kiu regos. Konfliktoj estas traktataj de politike partiaj kortumoj. Via religio estas teorie elektebla de vi mem, sed vi devas akcepti konsekvencojn, kiam ĝi estas ne la ĝusta. Kiam vi publike kritikas la regantojn, povas okazi ke vi perdos vian laboron, aŭ ke via loĝejo brulos.

Ekzemplaj landoj estas:

1. Rusujo, Nordkoreo.

2. Saŭdarabio, Omano.

3. Sudano, Zairo.

4. Irano, Afganujo.

5. Stalina Sovjetunio, Ĉinujo.

6. Plej multaj EU-landoj, Kanado.

7. Usono, Turkujo.

# Postrimarkigo

Multaj homoj nuntempe plendas, ke ja ankaŭ la demokratiaj ŝtatoj ne garantias plenan justecon, riĉon por ĉiuj, kaj foreston de konfliktoj. Pro tio multaj diras, ke ĝi ne funkcias, estas nura iluzio, kaj same malbonas kiel la aliaj ŝtatoformoj, ĉar ankaŭ en demokratiaj landoj ekzistas neegaleco, povruloj, krimoj, korupteco, kaj nekontento. Tio veras. Tamen rimarkeblas, ke grandaj nombroj da homoj fuĝas el ŝtatoj de ĉiuj aliaj specoj al la landoj kun sufiĉe reale funkcianta demokratio. Kontraste, ne estas observata ke grandaj nombroj da homoj fuĝas el ŝtatoj de speco ses al ŝtatoj de la aliaj specoj.

Ke ankaŭ funkciantaj demokratioj ne kreis la paradizon sur tero venas el tio, ke homoj ne estas naturaj bonuloj, ne estas egalaj, estas pelitaj de variaj emoj kiujn ili ne povas superregi. Demokratio provas tion balancigi, sed estas neniu supera forto kiu povas vere atingi tion. Demokratio miaopinie evidente estas la plej bona provo organizi la ampleksan kinvivadon de multaj homoj kiun ni ĝis nun konas. Kompreneble, ĝi funkcius pli bone, se la homoj estus pli bonaj, pli helpemaj, malpli egoismaj, ktp. Sed la plej akraj kritikistoj de demokratioj kutime ne donas la impreson, ke ili mem estas tiaj afablaj homoj.

Ŭinstn Ĉerĉil iam diris: Demokratio estas la plej malbona regosistemo, escepte de ĉiuj aliaj.

Fama momento el la krimserio Kolombo, kaj la dialogo, kiun oni de vi kaŝis:



"Spoko, vi Vulkananoj estas ja tiom logike pensantaj uloj, diru al mi, kial vi ne ekuzis Esperanton?"

"Estantaj logikaj pensantuloj, ni ja lernis Loglanon. Sed ni plievoluigis ĝin, ĉar ĝi havis kelkajn logikajn truojn. Sed kredu min, tio estas nenio por homoj."

# Diversaĵoj

## Ŝerco

Viro vizitis advokaton.

Advokato: “Kontraŭ $100 vi rajtas starigi tri demandojn.”

Viro: “Inkluzive de imposto?”

Advokato: “Jes ja.”

Viro: “Bone. Ĉu mi  rajtas starigi ilin nun?”

Advokato: “Kompreneble. Kio estas via lasta demando?”

**Proverbo de la monato** (elektita de Georg)

Hodiaŭ mi prezentas proverbon, kiu temas pri riĉeco kaj la ligita potenco, kiu kvazaŭ ĉiam kaj ĉie allogas fari ajnajn stultaĵojn aŭ ne bone antaŭkalkulitajn paŝojn. En demokratiaj sistemoj, kiam temas pri politikistoj, tiu baldaŭ estos punita de balotantoj … en totaliara sistemo bedaŭrinde malofte aŭ sufiĉe malfrue.

https://www.robkeetlaer.nl/esperanto/proverbaro/proverbo_002091.htm

„Riĉeco sen gvido kiel ĉevalo sen brido“

## Enigmo

de Felmano Ulriko

Estas Frankfurta sagao, ke nia nacia poeto Goethe lernis la recepton por la Verda Saŭco en Italujo kaj popularigis ĝin poste en Frankfurto. Konata estas, ke li ŝatis tiun manĝaĵon, kaj ke ĝi estis kuirata en la Goethe-familia domo (kiu hodiaŭ estas muzeo). Sed Goethe ne portis ĝin al Frankfurto. Kiu scias, kiam kiel kiu enkondukis la Verdan Saŭcon en la urbon kaj regionon?

Solvo de la lasta enigmo: Neniu ĝis nun solvis ...

# Esperantaĵo

## Antaŭ-Anoncoj:

### 26an ĝis 28an de junio 2026

Kultura Semajnfino 2026 en Homburgo, Sarlando, la 26an ĝis 28an de junio
Sarlanda Esperanto-Ligo okazigos sian **75an** Kulturan Semajnfinon de la 26a ĝis la 28a de junio 2026 en Homburgo. Legu pli ĉe https://sezonoj.ru/2026/05/germanujo-46/ [sel] https://eventaservo.org/e/35008f

### 24.9 ĝis 04.10.2026 Interkultura semajno IKW


La IKW "interkultura semajno" okazos kun la moto "Frankfurto en la spotlumo - Voĉoj de kunekzistado" de la 24.09. ĝis 04.10.2026. Registriĝo estas malfermita ĝis la 26-a de junio. Somere okazos kunveno, kie ĉiuj registritaj asocioj povos konatiĝi kaj plani kune. Ĉu vi havas ideon kiel ni povus partopreni je la programo? Vidu https://www.crece-ev.org/

### 6an ĝis 9an majon 2027 GEK-kongreso

Venonta Germana Esperanto kongreso okazos en Darmstadt dum ĉielira semajnfino 2027. Pro tio, ke estas kvazaŭ hejmludo por frankfurtanoj eble kelkaj de nia klubo pretas plani prelegojn, ekskursojn aŭ la kulturan programon en kaj pri nia regiono.
https://www.esperanto.de/de/deutscher-esperanto-kongress

---



# Lasta Paĝo

Satiro el la interreta telegrama babilada kanalo „Esperanto kaj teĥniko“:

